

Finlay vivas en ?iu sukceso de la kuba scienco 106-jarojn post forpaso



?i tiun 19-an de a?gusto ni memoras la dron. Carlos Juan Finlay en la 106-a datreveno de lia morto.

Eminenta epidemiologo kaj mikrobiologo naskita en Camaguey, orienta provinco de Kubo la 3an de decembro 1833, Finlay estas konsiderita geniulo de kuba medicino kaj estis nomumita por la Nobel-premio pri medicino.

La verko kaj ekzemplo de Carlos J. Finlay enkorpi?as en la viroj kaj virinoj de scienco, kiuj dedi?is sian vivon al esplorado kaj trovado de solvoj al la enigmoj de scienco, precipe en la kampo de medicino.

Liaj grandaj observopovoj igis lin malkovri la transmisian agenton de flava febro. ?i tiu malkovro ebligis purigi la areojn invaditajn de ?i tiu infekta agento tra la mondo.

Finlay estis la viro, kiu siatempe plej sciis pri flava febro. Li dediĝis sin al studado, serĉado de datumoj, interŝanĝo kun aliaj epidemiologoj kaj legado de ĉio pri la malsano.

Post multaj studoj pri malsamaj vojoj kaj ebloj de transdono de la malsano, Finlay identigis la moskiton hodiaŭ konatan kiel *Aedes Aegypti* kiel la transdona agento.

Tiel, la 18-an de februaro, 1881, antaŭ 140 jaroj, Finlay anoncis antaŭ la 5-a Internacia Sanitara Konferenco en Vaŝingtono sian teorion pri la kontaĝo de flava febro, kio igas lin unu el la plej geniaj epidemiologoj, kvankam lia postulato reprezentis rompon kun la regantaj epidemiologiaj konceptoj ĝis tiam.

Li daŭrigis siajn studojn ĝis li povis pruvi sian teorion, sed li ne haltis tie, sed proponis manieron forigi la malsanon per tio, kio nun estas konata kiel interveno por elradikigi la vektoron per kampanjoj kontraŭ la moskito *Aedes Aegypti*.

Honore al ĉi tiu genio de la kuba medicino kreiĝis en Kubo la Merita Ordo "Carlos J. Finlay", kiu estas donata al tiuj, kiuj ofertas taŭgajn servojn al scienco, kaj la 3an de decembro, la daton de lia naskiĝo, oni festas la Tagon de Latinamerika Medicino.

La plej bona maniero honori la memoron de d-ro. Carlos J. Finlay evidentas hodiaŭ en la atingoj de kuba medicino, kaj en la progresoj de vakcinoj kaj vakcino-kandidatoj kontraŭ Kovim-19, kiuj denove levas la nomon de kuba scienco, kiel heredigis al ni d-ro. Carlos Juan Finlay de antaŭ pli ol cent jaroj.

<https://www.radiohc.cu/eo/especiales/exclusivas/267481-finlay-vivas-en-ciu-sukceso-de-la-kuba-scienco-106-jarojn-post-forpaso>



Radio Habana Cuba